# Sud-Rejna Kuriero

Februaro 2017

Komuna inform-bulteno de
**Esperanto-Societo Basel** kaj
**Mulhouse-Esperanto**

N°65

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr

Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj,*
*karaj legantoj,*



Akvarelo el Japanio

*En lasta decembro nia grupo organizis la 3-landan Zamenhof-feston en La Forge proksime de Colmar kaj ni multon eksciis pri la fama kuracisto Albert Schweitzer.*

*Jarfine Luminesk estis unu el la ferio-semajno en Germanio por kune festi nov-jariĝon.*

*Malgraŭ frosta vetero ni tradicie festis en januaro la 3 reĝojn, sed ĉi-foje kun surprizo.*

*Grava evento en Colmar en venonta majo: nia grupo kunlaboras por la organizado de la venonta IFEF-kongreso en majo 2017. Sam-okaze kaj sam-loke nia grupo proponas okazigi la 81an regionan staĝon. Aliĝilo kaj programo troviĝas en ĉi-tiu numero.*

*El Nord-Irlando venis simpatia mesaĝo de Kris kaj John, konataj pro iliaj vojaĝemo kaj vizitoj al Alzaco*

***La 10an de februaro okazos nia Ĝenerala Membro-Kunveno en Espace 110. Ĉiuj membroj estas invititaj por kune diskuti kaj decidi.***

*Bernard kapablas lerte kaj sperte trovi la vortojn por kuraĝigi nin vivi pace kaj harmonie en la nova jaro 2017.*

*Ankaŭ vi havu la eblecon ĝui nian lingvon Esperanto en 2017 okaze de staĝo, kongresoj aŭ ferio-semajnoj.*

*André Grossmann*

## Programo 2017



| | | |
|---|---|---|
| **Ĵaŭdo** | **26.01.2017** | **Ĝenerala jarkunveno 2017** |
| **Lundo** | **27.02.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **Jaŭdo** | **23.03.2017** | **Monata kunveno : Babilado** |
| **Lundo** | **24.04.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **Ĵaŭdo** | **18.05.2017** | **Monata kunveno : Grün 80 /Blauen** |
| **Lundo** | **26.06.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **SOMERA PAŬZO** | | |
| **Ĵaŭdo** | **28.09.2017** | **Monata kunveno : Somero** |
| **Lundo** | **30.10.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **Ĵaŭdo** | **23.11.2017** | **Monata kunveno : Programo** |
| **Sabato** | **09.12.2017** | **Zamenhofa festo en Svislando** |

# KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2017-2019

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj  por la 3 venontaj jaroj.

| Jaro | Reta versio (pdf) | Papera versio | Kolora ekzemplero |
|---|---|---|---|
| 2017 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2018 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2019 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

# Alvoko por la Internacia Virina Tago 2017

## Mesaĝo por la Internacia Virina Tago 2017, Hiroŝima

Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo,

Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2017 Hiroŝima, konsistas el 21 organizoj kaj la municipo Hiroŝima, salutas vin solidarece, kaj elkore alvokas al vi. En la 5-a de marto, 2017, por la Internacia Virina Tago de UN, ni havos kunvenon por kunlaboro per saĝoj kaj fortoj, kaj antaŭenpuŝi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj.

Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hiroŝima organizas kunlaborojn por heredigo de la socio paca al sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antaŭenpuŝo de komuna partopreno de geviroj.

La mondo pli ol ĝis nun rekte frontas kontraŭ terorismo kaj ĉeno de venĝo. En multaj landoj tre skuiĝas kaj politiko kaj ekonomio. Oni komunikas suferon kaj malĝojon de malfortaj homoj en nuna situacio. Ĝuste nun dezirata estas la socio, en kiu ĉiuj povas vivi egalrajte.

La ĉefa temo de la Internacia Virina Tago 1917 Hirosimo estas “Mi vivas en Hiroŝimo, en Japanio, en la mondo.” En la kunveno de la Tago ni aprezos la filmon “Urbo de vespera kalmo, Lando de ĉerizfloro.” Kaj kiel urbano de atombombita Hirosimo pripensos elektadon kaj agadon al konstruo de vere paca mondo, por ke ne ripetu militan hororon plu en la mondo.

Ĉiu en ĉiutaga vivo en sia loko pripensu kaj komuniku pri paco.

Ni el Hiroŝimo elkore alvokas al vi ĉiuj en la mondo solvon de konflikto ne per milita povo.

Bonvole donu al ni vian mesaĝon por 2017,

1) Kio estas grava por paco laŭ via opinio ? (en 5 linioj)
2) Se vi sendos vian portreton, ni prezentos kun via mesaĝo.

Vian mesaĝon ni ekspozicios ĉe la Virina Centro de municipo Hiroŝima.

S-ino MATUMURA Aiko, Prezidanto de la plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2016, Hiroŝima

La municipo Hiroŝima

Kun virinaj organizoj:

Arko de Hiroŝima/ Kina karavano/ Novjapana virina asocio/ Ligo de vartistoj/ Hiroŝima Esperanto-Centro/ Sindikato de emeritoj/ Ligo de medicinaj sindikatoj/ Instruista laborsindikato/ Ligo de solaj patrino k infano(urba)/ Laborsindikato de municipaj oficistoj/ Laborsindikato de urbaj oficistoj/

Ligo de patrinoj de la urbo / Ligo de lokaj virinaj asocioj de Hiroŝima/ Ligo de virinaj asocioj WENET/ Ligo de Komercistoj/ Virina demokrata klubo/ YWCA/ Centro de komuna partopreno de geviroj en la socio/
Ligo de Patrinoj de la gubernio/ Sekcio de komuna partopreno de geviroj de municipo Hiroŝima/Konsilio de Kino-rondoj de la urbo.

**Limdato kaj aliaj: la 15-a de februaro 2017.**
**Maksimume en kvin linioj. Bonvolu kunmeti vian portreton. Ankaŭ viroj rajtas skribi al ni.**
**Kun notoj petataj: Nomo, sekso, aĝo se eble, profesio, loĝloko (urbonomo), lando.**
**Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp**
**Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hiroŝima, 734-0041 Japanio**

# Rigardo al la Svisa Esperanto-kalendaro

## Februaro 2017

6-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

9-an de februaro 2017, 20h00: Laŭzano, Espace Dickens, Avenue Charles Dickens 6: Ordinara Asembleo de Laŭzana Esperanto-Asocio

13-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

18-an de februaro 2017, 10h00-17h30, La Chaux-de-Fonds, Urba Biblioteko, CDELI, Rue du Progrès 33: Studsabato (vidu pli)

20-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

23-an de februaro 2017, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): Ĝenerala Kunveno de Esperanto-Societo Zuriko kaj kafoklaĉo (vidu pli)

24-an de februaro 2017, 19h30: Laŭzano, Espace Dickens, Avenue Charles Dickens 6: Babila rondo ambaŭ grupoj (gvidas Knud kaj M.-A.)

27-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

## Marto 2017

6-an de marto 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

13-an de marto 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

18-an de marto 2017, 10h00-17h30, La Chaux-de-Fonds, Urba Biblioteko, CDELI, Rue du Progrès 33: Studsabato (vidu pli)

20-an de marto 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

24-an de marto 2017, 19h30: Laŭzano, Espace Dickens, Avenue Charles Dickens 6: Babila rondo ambaŭ grupoj (gvidas Rosario)

27-an de marto 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

30-an de marto 2017, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): Libera kunveno kaj kafoklaĉo (vidu pli)

## Aprilo 2017

3-an de aprilo 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

10-an de aprilo 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

14-an de aprilo: 100-jara datreveno de la forpaso de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de la Lingvo Internacia Esperanto, Malfermo de la Zamenhofjaro

17-an de aprilo 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lun-

da babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

21-an de aprilo 2017, 19h30: Laŭzano, Espace Dickens, Avenue Charles Dickens 6: Babila rondo ambaŭ grupoj (gvidas Monique kaj Giulio)

22-an de aprilo 2017, 10h00-17h30, La Chaux-de-Fonds, Urba Biblioteko, CDELI, Rue du Progrès 33: Studsabato (vidu pli)

24-an de aprilo 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

27-an de aprilo 2017, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): Libera kunveno kaj kafoklaĉo (vidu pli)

## Agad-raporto de Mulhouse-Esperanto por la jaro 2016 fare de la sekretario.

Kursoj por progresantoj okazis ĉiu-semajne, plejofte vendrede en Espace 110. La nombro de la gelernantoj estas 3.

Kursoj por komencanto okazis mardon en Espace 110. Ĉeestas unu persono.

La kunvenoj "verda fadeno" regule okazis alterne en Mulhouse aŭ Rixheim kaj St Louis la lastan lundon de ĉiu monato. Nun estas 14 personoj enskribitaj en la dissendo-listo verda-babilejo.

En la 8a de januaro okazis la tri-reĝa festo. Ĉiuj povis gustumi la tortojn kaj la vinon!

La Ĝenerala Membro Kunveno okazis la 24an de februaro en Espace 110.

La 10a Mediteranea Esperanto-Semajno okazis en Les Issambres de la 5a ĝis la 12 marto. Kelkaj membroj de Mulhouse partoprenis.

En aprilo, Roberto Kueny vojaĝis al Irano por renkonti malnovan amikon, kiu lin ekkonis en la Universala Kongreso en Rotterdamo. Li kun siaj amikoj rondiris je 2500 km dum unu semajno.

La 79a Regiona Staĝo de Esperanto okazis en Art sur Meurthe apud Nancy la 22/23/24ajn de aprilo.

Denove multe esperantistoj retroviĝis por la amika tago en Freiburg je la 25a de junio. En la programo de la tago, la ekskurso al monto Schauinsland.

11 membroj partoprenis al la tradicia komuna manĝo de la fino de

la lerno-jaro en la restoracio Le Vinci en Sausheim la 13an de junio.

De 23an ĝis la 30an de julio okazis la 101 Universala Kongreso en Nitra. Multe da anoj de la asocio partoprenis.

Pluraj membroj de la asocio partoprenis al la 38a Bavelo-seminaro en Rastatt je la 4 – 5 – 6aj de novembro.

La 24an de septembro grupo de esperanto-amikoj el ambaŭ najbarajlandoj Germanujo kaj Francujo vizitis la river-centralon de Iffezheim.

La 18an kaj la 19an de novembro ni partoprenis en Ungersheim al foiro pri ekologio kaj justa komercado.

La Zamhofa festo okazis en la ĉirkaŭaĵo de Colmar la 10an de decembro.

Partoprenis ankaŭ membroj de nia asocio al:

La 24a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj turismo en Cambrils, Katalunio en octobro.

SRK aperis 4 foje.

Nia retejo http://mulhouse.esperanto.free.fr

Niaj dissendo-listoj por facile komuniki:

- mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr
- verdababilejo@googlegroups.com

**Ĉiuj membroj estas invititaj al nia Ĝenerala Membro-Kunveno, la 10an de februaro en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a**

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

**http://mulhouse.esperanto.free.fr**

**Fotoj pri pasintaj eventoj**
**Aliĝiloj kaj turisma prospekto por la IFEF-kongreso en majo**
**Aliĝilo kaj por nia regiona staĝo en Colmar.**
**Ligoj al aliaj retejoj en Francio kaj en la mondo.**
**Libroj de nia biblioteko.**

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

**mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr**

Por babili en Esperanto ni uzas jenan dissendoliston:

**verda-babilejo@googlegroups.com**

# Zamenhof-festo

## en La Forge (Wintzenheim) la 10an de decembro 2016

Jen estis ĉi-jare la vico por la grupo de Mulhouse-Esperanto okazigi la tri-landan Zamenhof-feston en Francio. Edmond Ludwig kaj Michel Basso transprenis la organizadon en la ĉirkaŭaĵo de Colmar. Ili deziris aparte emfazi la vivon kaj la filozofion de Albert Schweitzer.

Tial la unua rendevuo estis en **la domon/muzeon de la fama teologo, filozofo, orgenisto kaj ĝangala doktoro Albert SCHWEITZER en Gunsbach**





En tiu mateno de la 10a de decembro pli 20 samideanoj troviĝis en la domo de Albert SCHWEITZER en Gunsbach. Ili venis de Germanio, Svislando kaj krom membroj de Mulhouse-Esperanto, ankaŭ gastoj el Nancio.

Unue Edmond Ludwig klarigis pri la vivo kaj filozofio de tiu ĝangala kuracisto.

Poste la gvidanto de la muzeo pasie kaj entuziasme rakontis pri Albert Schweitzer en la franca kaj en la germanaj lingvoj. Li menciis multajn detalajn travivaĵoj ekde lia infanaĝo kaj ilin lokis en la tiama politika situacio de Alzaco.



La aŭskultantoj ŝatis plurajn humurajn detalojn, kiuj ankaŭ montris lian fortan karakteron, lian persistemon. Lia tuta vivo disvolviĝis ĉirkaŭ lia fundamenta kredo: la respekto al la vivo.

Kia homo, kia humanisto!!

Post tiu ege instruiga vizito, ĉiuj veturis al la restoracio en La Forge (ĉe Wintzenheim).



En la restoracio Le val Munster Brasserie necesis iom pacienci por mendi kaj ricevi la manĝojn.



Sed dume viglis babiladoj inter retrovitaj konatoj kaj amikoj.

Post la manĝo Roberto rakontis pri sia vojaĝo kaj vizito al Irano. Li prezentis kaj komentis multajn fotojn de tiu malbone konata lando kaj klarigis pri la vivo de siaj gastigantoj, ankaŭ esperantistoj.

Kun emocio li deklamis iranajn poemojn jam aperintajn en Esperanto.

Estis ankaŭ okazo prezenti kaj paroli pri estontaj eventoj de la jaro 2017. Ursula Niesert aparte emfazis la Germanan Esperanto-Kongreson, kiu okazos en Frajburgo en venonta Pentekosto.

Ankaŭa Andreo informis pri la tut-semajna IFEF-kongreso, kiu okazos en venonta majo en Colmar, kun ebleco pri turismado tra Alzaco. Tie estas atendataj pluraj eksterlandaj partoprenantoj.

La regiona printempa staĝo de EFE kaj Bavelo estos parto de tiu kongreso.

Edmond Ludwig kunportis sian akordionon kaj instigis la partoprenantojn kunkanti kelkajn amuzajn kaj humurajn kantojn.



La vespero finiĝis en tiu agrabla estoso, sed jam malfruis por viziti la domon de la fromaĝo.



Tekstoj kaj fotoj de Andreo

Dankon al Bernard, kiu tradukis tiun tekston pri la vivo de Albert Schweitzer

Respekto al la vivo

Ni malrapide navigis kontraŭ la fluo, serĉante nian vojon ne sen klopodoj inter la sablo-tavoloj. Tiam estis la seka sezono. Sidanta sur la ferdeko de unu el la trenŝipoj, indiferenta al mia ĉirkaŭaĵo, mi klopodis por ekkapti tiun elementan kaj universalan nocion de la etiko, kiun neniu filozofio diras al ni. Skribante paĝon post paĝo, mi havis neniun alian celon ol fiksi mian menson pri tiu afero, kiu daŭre eskapis. Du tagoj pasis. Je la vespero de la tria, dum ni antaŭen-iris en la lumo de la subiranta suno, disigante apudan aron da hipopotamoj, subite ekaperis al mi, sen ke mi antaŭsentis aŭ serĉis ilin, la vortojn "Respekto al la vivo". Jen kvazaŭ bronza pordo cedis. La pado montriĝis tra la densa vepro. Fine mi malfermis vojon al la centro, kie la aserto de la mondo kaj de la vivo kuniĝas en la etiko.

Mi komprenis la esencon de la problemo. Mi sciis ke tiu tuto, kiu determinas indan civilizacion, trovas sian fundamenton en la penso.

Albert Schweitzer, *Ma vie et ma pensée* (Mia vivo kaj mia penso), eld. Albin Michel, Parizo, 1960, pĝ. 171.

La kunteksto de la "malkovro"

Kiam, en 1931, Albert Schweitzer rakontas sian malkovron de la esprimo "respekto al la vivo", nocio destinita por fondi la tuton de la etiko kaj esti komprenata kaj akceptata de ĉiu ajn, li situas ĝin en Afriko, en septembro 1915, dum plurtaga vojaĝo sur la rivero; vokita kuraci la edzinon de misiisto, kiu estis preskaŭ ducent kilometroj for de kie li loĝis, li devis navigi per "vaporŝipeto (. . .) kiu trenis du superŝarĝitajn trenŝipojn".

Mathieu Arnold, *Albert Schweitzer La kompato kaj la racio*, Albert Schweitzer La compassion et la raison, Eldonoj Olivétan, Lyon, 2015, p. 66.




Jarfine jam okazis la dua Luminesk, ĉi-foje en Kleve en okcidenta Germanio proksime al la Nederlanda Landlimo. Andreas Diemel, komisiito de GEA (Germana Esperanto Asocio), transprenis la organizadon kun la helpo de Alfred Schubert, eksa ĉefredaktoro de germana E- aktuell.

Certe ĝi estas pli modesta aranĝo ol la antaŭa IF, sed la etoso estis simpatia kaj amika. Kelkaj partoprenantoj iniciatis plurajn programerojn, kiuj iel fariĝis plen-sukcesaj kaj kontribuis al la plena sukceso de tiu semajno.



Ĝis komenciĝis la 28an de decembro, en la stacidomo de Kleve bone funkciis la transporta servo. La junulargastejo troviĝis iom rande de la urbo sur monteto. Rapide Andreas Diemel prizorgis la akceptadon kaj transdonon de ĉambro-ŝlosiloj. Jam konataj vizaĝoj aperis, ni ja estas ĉe Luminesk.

En la interkona vespero sin prezentis la diversaj prelegantoj kaj en tiu unua vespero ni eksciis pri la feroaj dancoj. Martin Strid el Svedio detale klarigis pri la originoj, la tradicioj, la celoj kaj iniciatis al tiaj rondo-dancoj kun forta deklamado de iuj rakontoj, feliĉaj aŭ tragikaj. Li mem tradukas al Esperanto centojn da tiaj rakontoj.

Li montris filmojn pri tiaj dancoj sur la Feroa insulo.






## Pri la cetero de la semajno raportos Liu Jun kaj Dieter Rooke

Loko : urbo Kleve, germanio en junulargastejo

Venis partoprenantoj plejparte el Germanio, Nederlando, Svislando, Francio, Pollando, Belgio, Kubo. (ĉ. 50 aliĝintoj) Tial ĝi vere estis festivalo internacia.

Prelegoj de diversaj temoj altiris ĉeestantojn.

S-ro Alfred Schubert prezidanto de TEĴA, lumbild-prelegis pri antaŭkongreso de Nitra, vizito de E-muzeo en Switavy.

Per malrapida traktoro-kaleŝo ni vizitis ekologian farm-bienon. La farmestro klarigis sian biologian entreprenon. Li bredas bovinojn, produktas ties furaĝon, vendas lakton, fromaĝon, viandon kaj legomojn sen artefaritaj kemiaĵoj. Poste ni trarigardis etan vilaĝon ĉe bordo de rivero Rejno. La vilaĝestro rakontis la 800 jaran historion kaj la konstruon de grandaj digoj.





S-ro Petro Kühnel prezentis projekton de Esperanto-domo en Katmanduo ĉefurbo de Nepalo kaj kolektis monojn por subteni la E-movadon.

S-ro Brandenburg, eksa multjara ambasadoro en Moskvo, prelegis pri politikaj rilatoj inter Rusio kaj Germanio. Pro sia lasta ofic-periodo kiel ambasadoro en Portugalio, li montris lumbildojn pri la ĉefurbo Lisbono. La pejzaĝon li fotis dum libertempaj ekskursoj. Lia edzino regalis la aŭskultantojn per frandaĵoj portugalaj kaj fama dolĉa porto-vino.

S-ro Dieter Rooke refoje organizis komunan parkeran kantadon de E- himno „La espero“.

S-ino Liu Jun kondukis Lumineskanojn al Ĉinio: Spekteblis videofilmoj de printempa festo, silka vojo, kaj la aŭtoro Lusin (Luxun) Lumbildoj de tradiciaj vestoj, antikvaj kaj modernaj konstruaĵoj kompletigis la prezenton.

Dum tuta semajno ĉiuj vesperoj estis kun allogaj programeroj.



Gufujo komenciĝis post la 22-a horo. Ĝin sukcesege gvidis ges-roj Kleemann. Geamikoj ĝue trinkas teon, aŭskultante poemon, fabel-rakonton, kvizon kaj Esperanto-ŝercojn. Venis E-kantisto Johnny M. Li portis mojosan etoson al ni. Dum internacia vespero la tri voĉa kanto „Donu al ni pacon " plenumita de Luminesko ĥoro kortuŝis la publikon.



Junulo studento el Kubo, dancigis nin ĉiujn per ritmaj danco-paŝoj el suda ameriko kaj aparte el Kubo.



Samtempe ni ekzercis la polonezon por silvestra balo.

La novjara sonorilo anoncas, dume la lumineska ĥoro verve ekkantas : „Vino venkas " (teksto de Mark Fettes prezidanto de UEA) kun abunda ĉampanjo, multaj interkisadoj, toste ni bondeziris unu la alian la feliĉan novan jaron ĝi la krepuskan sunsubiron.

La dua ekskurso kondukis nin al proksima Nederlando, urbo Nimego (Nijmvegen). Ĝin fondis antaŭ 2 mil jaroj romianoj. Ni provis deĉifri la latinlingvajn sloganojn sur muroj de fortreso. Afabla loka E-isto, S-ro Pit ĉiĉeronis nin tra la rekonstruita urbocentro, komplete detruita dum la dua mondmilito. Kia ĉarma antikva bela urbo!

Kun ĝojo kaj sen fino ni himnos pri la sekva LUMINESK en urbo Monastero (Münster) Germanio.

Raportas Liu Jun kaj Dieter Rooke, fotoj de Andreo



# Tri-reĝa festo sen reĝo sed kun unu nura reĝino en Espace 110



La 10an de januaro 2017 okazis nia festa kunveno por la 3-reĝa festo. Ĝi jam estas tute tradicia renkontiĝo de nia grupo en la komenco de la jaro. En tiu mateno la vetero estis malfavora, feliĉe en la posttagmezo ĝi pliboniĝis. Tial tamen respondis al la invito 10 personoj, membroj de nia grupo.
Ĵus finiĝis la kurso por komencantoj, Irena kaj Simone zorgis por pretigi la 3 migdalotortojn. Estis ankaŭ surtabligita boteloj da blanka vino, da suko.



Alvenis pliaj gastoj el valoj de Thann kaj Munster kaj ankaŭ el Saint-Louis.

Ni kune tostis por la nova jaro por sano, bonfarto, feliĉo kaj sukceso de nia grupo.

Baldaŭ ni eksciis ke Irena iĝis la reĝino de la vespero. Sed tute mistere, ŝi trovis la fabojn en la 3 tortoj.

Tial nur unu "triobla" reĝino.

Poste viglis la diskutoj pri niaj akivaĵoj kaj planoj en la nova jaro. Sed pri konkretaj problemoj ni diskutos okaze de nia Membro-kunveno la 10an de februaro.





Jen Roberto ĉiam instruema.

Kaj la festantoj por nia ununura reĝino






## Proverboj

- Lernu juna, por esti saĝa maljuna.
- Kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas.
- Kiom da kapoj, tiom da opinioj.
- Laboro kaj pacienco kondukas al potenco.
- Li atendas, ke la okazo venu al lia nazo.

En la retejo de Rob Keetlaer vi povas trovi 2120 proverbojn en Esperanto.

**Jen la plej bona reta proverbaro:**

**WWW.proverbaro.net**

# Verdaj fadenoj por amike babili en Esperanto

Post la decembra paŭzo nia verda fadeno denove povis okazi. La 30an de januaro 2017 kunvenis 12 samideanoj al tiu monata rendevuo, ĉi-foje en la restoracio en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome.

La restoracio havas taŭgan parkejon kaj la menuoj estas variaj, ne nur kun terpomoj.





Viglis la diskutoj pri estontaj aranĝoj, interalie pri la venonta IFEF-kongreso en Colmar kaj pri la diversaj taskoj, kiujn la LKK-anoj devos plenumi.

Ne mankis filozofiaj temoj, kiujn Bernard aparte ŝatas.

Ankaŭ estas okazo perfektiĝi en la lingvo, Antoine ne hezitis konsulti vortaron.

Sed nia venonta rendevuo estas nia Ĝenerala Membro-Kunveno la 10an de februaro en Espace 110.





Jen la kalendaro de venonta verdaj fadenoj.

- 27an de februaro en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- 27an de marto 2017 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- 24an de aprilo en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- 29an de majo 2017 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- 26an de junio en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.

Vi estas varme invitataj vin partopreni por havi la okazon aŭdi Esperanton kaj tute amike babili kun la partoprenantoj kaj poste vespermanĝi, laŭ la proponitaj menuoj.

# La 33a PSI

**10-a de aprilo 2017 ĝis 17-a de aprilo 2017**
**Essen**

La Printempa Semajno Internacia estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ pasko ie en Germanio.

Por la 33a PSI ni atendas pli ol 100 partoprenantojn el pli ol 10 landoj, el kiuj minimume kvarono estos infanoj aŭ junuloj.

PSI estas precipe familia seminario. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bonvena.

Por pli da informoj kun fotoj kaj aliĝ-ebleco:

**https://psi.esperanto.de/2017/**

espéranto France-Est

**En amikaj rilatoj kun BAVELO invitas vin al la :**

# 81a Regiona Staĝo de Esperanto
# la 19 - 20 - 21ajn de majo 2016
# en la hotelo Primo Balladins
# 5 rue des Ancêtres 68000 COLMAR

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en Colmar, en la kadro de IFEF-kongreso, la internacia kongreso de la fervojistoj. Ni povos ĝui la samajn programerojn de vendredo ĝis dimanĉo de tiu kongreso.
La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Mulhouse kun turisma gvidado fare de Edmond Ludwig.
Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Grazia Barboni el Italio.
Krome estas ankaŭ ebleco aliĝi al la ekskursoj de la postkongreso.




**Por pliaj informoj :**
andreo.ag16@free.fr
Tel. 03.69.54.46.93
poŝtel. 07.82.21.97.34
**Daŭre aktualigitaj informoj:**
http://esperanto.france.est.free.fr

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero. Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

**Propono**: Se vi deziras viziti la fervojan muzeon en Mulhouse vendrede post-tagmeze post la 14a, eblas rekte veturi al tiu muzeo. De la stacidomo de Mulhouse per tramo, direkto Lutterbach, haltejo Musée.

| ALIĜOJ | |
|---|---|
| Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio | 30 € |
| Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio | 46 € |
| Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto) | 18 € |
| Junulo inter 10 kaj 25 jaroj | 12 € |
| Infanoj malpli ol 10 jaroj | 3 € |
| Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla. | |

La diversaj tag- kaj vesper-manĝoj estas liberaj en restoracioj de la urbo, proksime de la hotelo aŭ de la salono Catherinette.



# Aliĝilo por la 81a Regiona Staĝo de Esperanto en Colmar la 19/20/21ajn de majo 2017

| S-ro S-ino | Familia nomo | Persona nomo | Malpli ol 18 aŭ studento | Aliĝ-kotizo | Elektita kurso |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | ĉef-aliĝanto | | | | |
| 2 | kun-aliĝantoj | | | | |
| 3 | | | | | |

Adreso

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas per ĉeko ☐ per ĝiro ☐ al André Grossmann CCP 819 34 U Strasbourg, per internacia ĝiro ☐ al nia peranto en Germanio ☐

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu) ☐

| **Nombro da tranoktadoj en la hotelo Primo Balladins inkluzive kun matenmanĝo** | Kosto por unu nokto kaj unu persono | Vendrede 19 | Sabate 20 | Dimanĉe 21 |
|---|---|---|---|---|
| **1 lita ĉambro** | 49 € | | | |
| **1 ĉambro en duobla geedza lito (por 2)** | 62 € | | | |
| **1 lito en 2 lita ĉambro** | 31 € | | | |
| **1 lito en 3 lita ĉambro** | 24 € | | | |
| **1 lito en 4 lita ĉambro** | 22 € | | | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Vendrede** 19.05 14a ĝis 18a | Ekskurso D2: Fervoja muzeo Mulhouse (veturado per buso ekde la hotelo) | 22 € | |
| **Sabate** 20.05 14a ĝis 19a | Ekskurso D3: Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr-Ĝardeno de papilioj | 18 € | |
| **Lunde** 22.05 9a ĝis 19a | Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo – **T1**: Strasburgo, Obernai | 40 € | |
| **Marde** 23.05 9a ĝis 18a | Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki | 35 € | |
| **Merkrede** 24.05 9a ĝis 18a | Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki | 35 € | |
| | kotizo + tranoktoj. + Ekskursoj | Sume | |
| Pagenda | ________ + ________ + ________ | | |

# Provizora Programo:

**Vendrede 19-an de majo 2017**

- 14a -18a **Ekskurso D2 – Fervoja muzeo Mulhouse**
- Poste Vespermanĝo
- 20a - 22 Kultura kaj dancvespero kun **Fernando** salono Catherinettes

**Sabate 20-an de majo 2017**

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a Vizito al la malnova urbo
- 09a - 12a E-kurso en la hotelo
- Poste Tagmanĝo
- 14a - 19a Ekskurso D3 – Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr - Ĝardeno de vivantaj papilioj
- 20a30 Kultura vespero - **Koncerto de Grazia Barboni**, Italio, en Catherinettes

**Dimanĉe 21-an de majo 2017**

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a - 12a **Ĉefa prelego kaj fakprelegoj,** salono Catherinettes
- 12a - 12a30 **Solena fermo**
- 13a tagmanĝo
- 14a30 komitat-kunsido de EFE

## Turismaj programoj

**Lunde 22-an de Majo**

**9a – 19a Tuttaga kskurso – Strasburgo, Obernai**

**Marde 23-an de Majo**

**9a - 18a**

Haut-Koenigsbourg, Ribeau-villé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tag-manĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki

**Merkrede 24-an de Majo**

**9a - 18a**

Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :**

André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

**Ĉekoj nome de:** André Grossmann
CCP 819 34 U Strasbourg

**Internaciaj ĝiroj al: IBAN:**
André Grossmann
FR6920041010150081934U03669
**BIC:** PSSTFRPPSTR

**Por Germanio al nia peranto:**
je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)
Poŝtĝirokonto:
918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen

**Pliaj informoj ĉe André Grossmann:**
andreo.ag16@free.fr
Tel. 03.69.54.46.93
poŝtel. 07.82.21.97.34

# Gastigado kaj amikaj kontaktoj

Maria Fournier el Hindligen en la sudo de Alzaco jam kelkfoje havis la okazon gastigi geamikojn el Norda Irlando, nome Kris kaj John Murray. Ŝi eĉ iam vizitis ilin en Norda Irlando.

Antaŭ iom da jaroj, kiam ili estis ŝiaj gastoj, ŝi proponis kune festi la jarfinon de nia grupo, tiam ankaŭ aliaj membroj de nia grupo povis konatiĝi kun Kris kaj John. Krome ili volonte partoprenas Esperanto-semajnojn en Katalunio, Rumanio kaj suda Francio en Issambres. Jen Ilia mesaĝo:



En Hindligen en suda Alzaco Kris kaj John kun Maria kaj Eugène.

Grandan Dankon al la Volontuloj

Estas tre malmultaj en la mondo, kiu sin vivtenas per Esperanto, sed estas multaj kiuj laboras volontule interne de ĝia maldensa diasporo. La semajnon, kiun ni ĝuis pasintjare en marto en Les Issambres (oriente de Saint-Tropez), organizis du lokaj esperantistoj, ilia deka aŭ dekunua fojo sed nia unua. La dekunu tagojn, kiujn ni ĝuis en junio vagante tra Rumanio, organizis unuopa Esperantistino de Brasovo, ŝia deka au dekunua fojo. Estas ja laciga laboro montri vian landon al vizitantoj, kiuj samtempe deziras ekspluati la maloftan oportunon ĝui la kunestadon de diverslandaj esperantistoj. Nian semajnon en oktobro en Cambrils sude de Barcelono organizis katalunaj esperantistoj, ilia 20-kelka fojo en marborda urbeto ie en Katalunio, tamen bedaŭrinde nur nia dua fojo. La aranĝoj en Les Issambres kaj Cambrils ambaŭ ekspluatis la avantaĝon de pli favoraj kostoj ekster la turista sezono. Ni esperas partopreni en alia bone konata feria aran-



Pentraĵoj de Kris: la plaĝo ĉe Les Issambres

ĝo, la pli kaj pli popularaj ‘ Baltiaj Tagoj’, ĉijare organizataj de lokaj volontuloj en Liepāja, Latvio.

Alia nord-irlanda paro el Portadown jam partoprenis eble la plej bone konatan stud-semajnon, SES, Somera Esperanto-Studado, en Slovakio, lastjare de la 15-a ĝis 23-a de julio en Banská Štiavnica. Ni ja aliĝis al la last-jara monda kongreso en Nitra, Slovakio, sed fine estis la paro de Portadow, kiu sukcese atingis ĝin. Ni tiam sentis nin iom eluzitaj, kaj devas nin kontentigi per la kongresaj filmoj en Jutubo. En 2017 la plej granda evento en Esperantio, la Universala Kongreso, estos en Seulo, Sud-Koreio, alia evento, kiuj dependas ĉefe je lokaj volontuloj, tamen tro fora loko por ni.


Alia pentraĵo de Kris: sunsubiro ĉe la Danuba delto en Rumanio

Ni ĉiuj ŝuldas vere multon al la homoj, kiuj organizis tiajn eventojn-kaj la lokajn grupojn, gazetojn, retejojn, ktp. Ja estas mireginde, ke Esperanto floras en la nuna feroce komerca kaj malpacema mondo. Oni demandis lastatempe dum loka radioprogramo kial se Esperanto estas tiel bona ideo kaj tiel riĉa, lernebla lingvo, ĝi ne pli sukcesas. La intervjuato tuj respondis, ke ĉar Esperanto apartenas al neniu nacio aŭ organizo, ĝi tute ne havas la forton de mono. Oni povus diri ‘salajrojn’. Rigardu nur al la grandaj monsumoj, kiujn elspezas oficiale la usonanoj, britoj, francoj, germanoj ktp je siaj lingvoj.


Birda rezervejo en Norfolk, kie ni feriis en majo kun nia pli aĝa filo, Kevino.

Ni mem volontulas (DV) labori dum monato ĉi-printempe en la Interkultura Centro en Herzberg am Harz, Germanio. Dum pli ol dek jaroj Herzberg titolas sin ‘ die Esperanto-Stadt’, ĉar ĝia estraro agnoskas Esperanton kiel utilan pontolingvon en ligoj alilandaj. Ni anticipas tie pluan edukadon pri kiel Esperanto obstine strebas al ĝia celo.

# KAJ PRI NI

Neniu el ni facile forgesos la jaron 2016. La nomoj 'Breksit', 'Trump' kaj 'Aleppo' hantadas la pensojn kaj parolojn de tre multaj homoj. Por konservi nian civitanecon en la EU ni tuj post la referendumo petis pas-portojn de la irlanda respubliko. Tiu de Johano alvenis sufiĉe rapide, sed Kris ne havas eĉ unu irlandan pra-gepatron, do ŝian peton oni ankoraŭ pri-traktas post sep monatoj. Ŝi devas ja meriti la rajton al dua civitaneco. Malgraŭ minacoj dum la kampanjo de Trump neniu el niaj gekuzoj fakte lasas Usonon — ĝis nun. Kvankam ni spektas dum la jaro multon pri la militado en Sirio, ni sentas, ke ni ne kapablas plene imagi la mortojn kaj suferojn tie.

Ni uzis ĉijare la loĝ-aŭton en Francio kaj Hispanio, sed vojaĝis trajne al Francio en marto kaj aviadile al Britio kaj Rumanio alitempe.

La semajnon, kiun ni ĝuis en marto en Les Issambres (oriente de Saint-Tropez), organizis lokaj esperantistoj, ilia deka aŭ dekunua fojo sed nia unua. La dekunu tagojn, kiujn ni ĝuis en junio vagante tra Rumanio, organizis unuopa Esperantistino de Braŝovo, ŝia deka aŭ dekunua fojo. La semajnon en oktrobro en Cambrils sude de Barcelono organizis lokaj esperantistoj, ilia



20-kelka fojo en marborda urbeto ie en Katalunio. Ni ŝuldas vere multon al tiaj homoj. Ja estas mireginde, ke Esperanto vivas en tiel feroce komerca kaj malpacema mondo.

Ĉiutage Kris ĝuas la malgrandajn birdojn, kiujn ŝi allogas en nian malgrandan ĝardenon per semoj, nuksoj kaj grasbuloj. Tamen ŝi suferis tre miksitan plezuron, kiam ŝi sukcese fotis pli grandan birdon, inan nizon sidantan sur nia ĝardena barilo. Tamen estis la lokoj for de la domo, kiuj vere instigis ŝin fotografi kaj pentri.

Ni estas anoj de la loka filio de nacia libertempa organizo por pli-aĝuloj, la U3A, la 'Universitato de la Tria Aĝo' (t.e. por la geava etapo). Ĝi havas aktivojn kaj grupojn por multaj flank-okupoj — korpaj, mensaj, ludaj, artismaj, ktp.

Kris aniĝis al du grupoj, unu por pentrado kaj unu por praktikado de la franca lingvo. Ekstere de la U3A Johano daŭrigas siajn penojn akiri iom da lerto pri la hispana lingvo, kaj samvespere liaj Perua instruisto kaj japana edzino poste provas praktiki sian Esperanton kun Johano. Nia vojaĝado interrompas ĉiujn aktivojn tiel multe, ke oni ofte rimarkas nian ĉeeston en la kvakera kunveno pli klare, kiam ni ĵus reaperas ol normale.

John kaj Kris Murray

## Libera opinio pri nia Esperanto- informlaboro

*En la lasta Informilo N°176 Edmond Ludwig prave maltrankviliĝis pri Esperanto-evoluo: kial nia multforma kaj kvalita informlaboro ne havas pli da sukceso? Kiel do pluen? Fakte ni jam bone scias, ke se Esperanto, universala lingvo facila, neŭtrala, profunde homa, kiu plejparte estigas simpation kaj komprenon, ne prospere iras pluen, la kialo estas esence politika. La nacioj ĉiam pretas starigi murojn inter si (krom por la transnaciaj entreprenoj), ne akceptas tiun allogan internacian komunikilon, ĉar ĝi minacas iliajn kulturajn ekonomikajn kaj politikajn ambiciojn. Temas nature pri ridinda antaŭjuĝo kaj honta rifuzo sekvi la Uneskajn rekomendojn favorajn al la Esperanta disvolvado ene de la ŝtato-membroj. Sed troviĝas, ke nur la naciaj regantaroj man-tenas la sorton de Esperanto. Ve! De post la fino de la Dua Mondmilito ili aliĝas al ultraliberala tutmondiĝo, kie la angla majstre regas, kaj kie neniam Esperanto trovos sian indan lokon. Ĉu do nia lingvo estas kondamnita resti nombre marĝena, nur enfermita en jaraj kongresoj kaj aliaj amikaj renkontoj inter samideanoj, kies aĝo-meznombro ne tre malaltiĝas?*

*Mi tion ne volas kredi, sed mi opinias, ke ĉar la ĉefa kontraŭado al Esperanto estas politika, nia informlaboro devas multe pli reliefigi ĝian ideologian dimension, pli insisti pri ĝia kultura kaj politika projekto. Ĉu ne estas tio, kio fundamente diferencigas ĝin de la aliaj lingvoj? Per partigo de komuna bono tre facile akirebla, ĝi estigas pli da kompreno, da solidareco inter la homoj, kaj tiel helpas la evoluon al mondo pli justa, pli paca. Hodiaŭ, tamen, se la nuna tutmondiĝo ankoraŭ ne dronas, ĝi komencas*

*ŝanceliĝi. Kaj feliĉe en la mondo venas nova sento kaj iras forta voko de homoj kaj movadoj, kiuj proponas alternativajn solvojn kaj universalajn valorojn perfekte kunpartigitajn de Esperanto. Tiu lingvo do nature subtenu tiujn ŝanĝoj kaj tiam konvinku. Mi certas, ke pli da homoj pretas strebi antaŭen al pli bona homa mondo. Jes, Esperanto estas aktivula lingvo kaj ni devas laŭtege tion aserti.*

*La movado "Mondcivitaneco" jam bone komprenis la simbolan forton de Esperanto kaj decidis traduki ĉiujn siajn dokumentojn. Jen ilustraĵo per eltiraĵo de ĝia ĉarto:*

---

*Ni, civitanoj de la mondo, opinias ke la agnosko pri la digno rilata al ĉiuj membroj de la homa familio kaj pri iliaj rajtoj egalaj kaj neforigeblaj konsistigas la fundamenton de libero, justo kaj paco en la mondo.*

---

*Ni volas:*

*-partopreni la kreon de demokratia monda parlamento, el kiu unu inter la modeloj estas la kongreso de la popoloj,*

*-promocii la pacon, la rifuzon pri diskriminacioj, la egalecon antaŭ la leĝo kaj la spiriton de solidareco,*

*-Krei spacon por reflektoj kaj interŝanĝoj malfermitan al ĉiuj kaj kontribui al la konstruado de solidareca mondo, kunigante la iniciatojn tieajn kaj alilokajn,*

*-riĉigi per niaj diversecoj por trovi niajn similecojn, kupli niajn pripensaĵojn al eksperimentado kaj agado konkreta sur la tereno,*

*-gardi la riĉaĵojn kaj la biodiversecon de nia planedo por la nuna kaj la estontaj generacioj,*

*-ke ĉiu individuo kaj grupo estu responsa pri la bonfarto de la aliaj kaj la harmonia evoluo de la planedo.*

*Ni alvokas ĉiun organismon kaj ĉiun individuon, kies idealoj estas mondcivitismaj kaj demokratiaj, aliĝi al mondcivitana asembleo por konstrui alian mondon, pli unuigantan kaj pacan, subskribante ĉi tiun ĉarton.*

*En Mulhouse, la 3an de oktobro 2004*

# Nia Kalendaro 2017

| | | |
|---|---|---|
| **Februaro**<br><br>**2017** | **10**<br><br><br>**3 - 10 - 17**<br><br>**7 - 14 - 28**<br><br>**27** | Nia grupo Mulhouse-Esperanto kunvenas por la Ĝenerala Membro-Kunveno en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a<br>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a aŭ 18a laŭ interkonsento.<br>Kursoj por komencantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis |
| **Marto**<br><br>**2017** | **17 - 24 - 31**<br><br>**14 - 21 - 28**<br><br>**27** | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a aŭ 18a laŭ interkonsento.<br>Kursoj por komencantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 21 la restoracio La Pataterie, rue de l'Aérodrome A35, 68170 RIXHEIM. |
| **Aprilo**<br><br>**2017** | **4 - 10 - 25**<br><br>**7 - 28**<br><br>**24** | Kursoj por komencantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.<br>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a aŭ 18a laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis |
| **Majo**<br><br>**2017** | **2 - 9**<br><br>**5 - 12 - 26**<br><br>**16 ĝis 24**<br><br>**19 ĝis 21**<br><br>**29** | Kursoj por komencantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.<br>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a aŭ 18a laŭ interkonsento.<br>IFEF-kongreso en Colmar kun organiza partopreno de nia asocio.<br>81a regiona staĝo de Esperanto en Colmar kun la sama programo kiel IFEF-kongreso.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 21 la restoracio La Pataterie, rue de l'Aérodrome 68170 RIXHEIM. |

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare.Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5,rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim.
Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.




Lumo de la naturo. Lumiganta lumo. Festa lumo.
Lumo portata, celebrata kaj disdonata.

Lumo por vidi kaj kompreni, por juste pensi, por bone kaj akurate paroli,
por agi en taŭga momento, por vivi kiel eble plej bone, por utile engaĝi sin,
por resti atenta, por bona sinregado.

Korbo de lumoj estas proponata al ni :
- decidi esti feliĉa,
- bone vivi kune laŭ propra devontigo,
- libere pensi kaj elekti la racion,
- respekti ĉiun vivon kaj ties dignon,
- krei aĵojn, kiuj civilizas kaj invitas al saĝo.

2017 helpu nin elekti kaj travivi belajn lumojn.

Bernard kaj Odette Behra
Akvarelo reproduktita kun la afabla permeso de S-ro Georges RATKOFF